# SUPLEMENTO AL SUDFRANCIA ☆ STELO

N°152 - 1a kvaronjaro 2000 - 1° *trimestre 2000* - 10 F
Dulingva bulteno eldonita de la E°- Federacio de Langvedoko-Rusiljono
*Bulletin bilingue édité par la Fédération d'espéranto du Languedoc-Roussillon*
Jarabono / *Abonnement : 35F* al pĉk / *au CCP 956-28 P Montpellier*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

**Kial tiu suplemento al "Sudfrancia Stelo" ?**
Ĉar de la fino de majo ĝis la komenco de julio okazos en nia regiono aŭ apude **eventoj, kiuj meritus vian partoprenon** kaj pri kiuj ni ne detale aŭ tute ne informis vin, ĉu en la lasta bulteno, ĉu dum la kunveno de Quissac . Pri eventoj ekster tiu periodo vi povos kompreneble legi en la venonta SFS, kiu aperos fine de junio (limdato por viaj kontribuoj : la 17a de junio)
*Pourquoi ce "supplément" à "Sudfrancia Stelo" ?*
*Parce que de la fin mai jusqu'au début juillet se dérouleront dans notre région ou à proximité* ***des évènements qui mériteraient votre participation*** *et dont nous ne vous avons pas informés dans le détail voire pas du tout, que ce soit dans le dernier bulletin ou lors de la réunion de Quissac. Concernant les évènements en dehors de cette période, vous pourrez évidemment lire dans le prochain SFS, qui paraîtra fin juin (date limite pour l'envoi de vos contributions le 17 juin).*

**Kiuj estas tiuj eventoj ?**
La vizito kaj **prelegoj de Ĉina paro** dum la staĝo de Batipaume (Agde) la 1an kaj 2an de junio, neformalaj invitoj al komuna **tagmanĝo en Montpellier** (la 22an de junio) kaj **semajnfino en Lozère** (17an kaj 18an de junio), ankaŭ **KAFE** (kultura kaj arta festivalo de esperanto) en **Tuluzo** komence de julio (de la 5a ĝis la 9a)...
*Quels sont ces évènements ?*
*La visite et les conférences d'un couple chinois lors du stage de Batipaume (Agde) les 1 et 2 Juin, des invitations informelles à un repas commun à Montpellier le 22 juin et à un week-end en Lozère les 17 et 18 juin, également KAFE (festival culturel et artistique d'espéranto) à Toulouse début juillet (du 5 au 9)...*

## ABONO KAJ REABONO AL SFS
### ABONNEMENT ET RÉABONNEMENT À SFS

***Des bénévoles se chargent d'ordonner, corriger et taper les textes reçus, de les faire imprimer, mettre sous enveloppe et expédier. Par contre, les photocopies, les timbres ne sont pas gratuits et nous avons besoin de votre abonnement ( 35F) pour continuer la parution de notre bulletin de liaison . Si le contenu ne vous satisfait pas, vous pouvez toujours le faire savoir au responsable de la rédaction; vos remarques seront prises en considération .***
***Ci-dessus le n° de CCPde la "Fédération d'espéranto du Languedoc-Roussillon", si vous réglez par chèque postal (n'oubliez pas d'indiquer sur le talon le motif de votre versement); si vous payez par chèque bancaire, adressez le à la trésorière Mme Négron, 40 Chemin des Amandiers 34400 Lunel . Merci de votre collaboration .***
***Fin juin, nous devrons supprimer de la liste de nos abonnés les noms de ceux qui n'auront pas encore réglé leur (ré)abonnement . A la date d'aujourd'hui,***
- ***votre abonnement est en règle et ce rappel ne vous concerne pas***
- ***votre abonnement n'a pas été enregistré, merci d'y remédier prochainement .***

## 28AN DE MAJO : PRIMA DE LAS LENGAS EN TULUZO


La celo de tiu jam tradicia festo estas prezenti maksimuman nombron da lingvoj, emfazante ilian egalecon . Kiel dum la pasintaj jaroj, ĝi estos okazo starigi vastan budon por prezenti esperanton kaj ties kulturon pere de libroj, gazetoj, diskoj,ret-konektoj en E°.
François Lo Jacomo intervenos dum la debatoj, kie estos diskutata la lingva politiko de Francio kaj klarigos la rolon de E°. Ĵak Le Puil, la konata trobadoro, ankaù partoprenos.

## AGDE/BATIPAUME : STAĜO (30 V - 6 VI)
## PRELEGOJ DE ĈINA PARO (1AN KAJ 2AN DE JUNIO)


Al la staĝo jam aliĝis tridek personoj . Gratulojn al la organizantoj pro ilia persistemo .
Eĉ se ne konkretiĝis pro vizoproblemoj la veno de Kossi Logossou (Togolando), de du Ghana-anoj, de paro el Irano, la etoso estos internacia . Gvidos la kursojn Nina Korjenenevskaja (Rusio), Mario Guzzi (Italio). Thierry Saladin, kiu spertas pri la Cseh-instrumetodo gvidos kurson . Ankaù vizitos la staĝon kaj prelegos dufoje ges.Shen el Ĉinio.
Ne estas tro malfrue por aliĝi la staĝon; rapide kontaktu Suzanne Authier 0467311318.
Se vi deziras partopreni unu el la vesperoj eĉ sen aliĝo al la staĝo, jen la antaùvidita programo (vesperoj komenciĝas post la vespermanĝo, do je ĉirkaù la 21a horo) :
merkredon 31/V : Nina Korjenevskaja ; ĵaùdon 1an kaj vendredon 2an de junio : la ĉina paro ; sabaton la 3an : Sro Bouman (Belgio) pri vojaĝo tra Aùstralio ; dimanĉon la 4an : Nina K.; lundon la 5an : nedifinita programo : ĉu "Incubus" (filmo tute en E°), ĉu filmo pri Israelo kaj vidbendo pri muzikskatoloj.
Bonan sukceson al la staĝo de Batipaume !

## 17AN KAJ 18AN DE JUNIO : SEMAJNFINO EN LOZERE

En Quissac estis esprimita la deziro sin retrovi unufoje en la jaro en alia kadro ol tiu de kunvenoj, kongresoj, ktp, alidirite en neformala etoso por pli bone interkonatiĝi .
La unua invito venis de Ges. Bernard, aktivaj esperantistoj, kiuj instaliĝis en nia regiono, kaj kiuj loĝas en belega loko en Lozère, kiu superstaras la faman kanjonon de la rivero Tarn. Dank'al la plibonigo de la vojo N9, nun parte aùtoŝoseo A 75, estas facile atingi rapide la departementon Lozère . Vi povas viziti nin dum la kompleta semajnfino aù nur dimanĉe .
Se vi ne havas veturilon, eblas uzi trajnon el Béziers ĝis la stacidomo Banassac-La Canourgue kaj de tie ni elturniĝos; la novaj horaroj, kiuj validos ekde la fino de majo, ne estas ankoraù konataj . Ni esperas, ke vi venos sufiĉe nombraj al tiu unua rendevuo kaj ke estontece estos aliaj rendevuoj por malkovri nian regionon kaj ĝian esperantistaron .




*En Ste-Enimie, sekvi la direkton "Aven Armand / Meyrueis" sur 8 kilometroj ĝis la rendevuejo "Col de Coperlac" .*



## AMIKA SEMAJNFINA RENKONTO EN LOZERE

**Col de Coperlac - altebenaĵo Causse Méjean - proksime de Ste Enimie**

**Programo :**

**Sabaton, la 17an de junio**

10h-12h : Akceptado de la partoprenantoj kaj pretigo de la tagmanĝo (helpe de ĉiuj, ne nur virinoj !)
12-12h30 : Aperitivo
12h30 : Subĉiela manĝo
15h : Promenado ĝis la krutaĵoj de la Tarn-gorĝoj (kanjono)
21h : Vespermanĝo : kradkuiraĵoj .

**Dimanĉon, la 18an de junio**

Matene kaj posttagmeze, laùplaĉe : ripozo, promenado, diskutado, babilado...
12h30 : subĉiela manĝo

Ni povas loĝigi kelkajn personojn (bonvolu alporti litaĵojn). Kompreneble, ni povas akcepti nedifinitan nombron da ruldomoj, tendoj kaj loĝaùtoj . Ankaù ebleco de "Gîtes" kaj hotelĉambroj .
Bonvolu kompletigi la ĉi-suban aliĝilon kaj resendi antaù la 10a de junio (ĉeko je la nomo de F.Bernard, adreso : Les Bories-Col de Coperlac-48210 Mas St Chély Tel/Fax : 04 66 48 58 48

ALIĜILO:

| Familia Nomo | Nombro de partoprenantoj | Sabato tagmanĝo | Sabato vespermanĝo | Dimanĉo matene | Dimanĉo tagmanĝo | SUMO |
|---|---|---|---|---|---|---|
| ................ | ................ | 50F x ......F | 30F x......F | 10F x......F | 50F x......F | ..............F |

## 22AN DE JUNIO : KOMUNA TAGMANĜO EN MONTPELLIER

Por kunigi la esperantistojn de Montpellier (tie estas tri E°-grupoj) en neformala etoso, pluraj tieaj esperantistoj iniciatis komunan trimestran tagmanĝon . La venonta okazos ĵaùdon la 22an de junio ekde la 12a horo . La loko "Brasserie du Millénaire, Place du Millénaire" estas sur pluraj buslinioj. Diversaj prezoj de menuoj . Kompreneble ne-Montpellieranoj estas ankaù bonvenaj . Por pliaj informoj aù simple por pli bone organizi tiun rendevuon, bonvolu kontakti anticipe la respondeculojn : 04 67 22 37 24 aù 04 67 69 11 32 . Bonan apetiton !

## KAFE : KULTURA KAJ ARTA FESTIVALO DE ESPERANTO EN TULUZO DE LA 5A ĜIS LA 9A DE JULIO :

SFS jam menciis plurfoje tiun eventon . Ĉar ĝi neniam okazis pli frue, ne eblas referenci al la pasinteco, sed ĉiam devas estis unua fojo ! En Tuluzo aktivas Floréal Martorell, kiu kulpas (inter aliaj) pri la aperigo de la kolekto Vinilkosmo 2000, entute 8 kompaktdiskoj kun konataj nomoj en Esperantio. En la kolekto estas titoloj por ĉiuj gustoj . Same Floréal preparis kun tuta skipo tiun KAFE kun "internacia kaj diversa paletro, io por ĉiu gusto", kiel indikis la lasta SFS . Ĉu ni simple konstatu la okazigon de tiu evento aù pro la proksimeco provu partopreni parton de ĝi ?
Ĉi-poste vi trovos la kompletan programon (modifetoj ĉiam eblas kompreneble) kaj tiel vi povos juĝi pri la riĉeco de la programo. La sukceso de KAFE estas ĉies afero .

La programo de KAFE entenas la plej multajn nuntempajn esperanto-artajn grupojn ĉiustilajn el diversaj landoj : Rokmuziko, varieteo, teatro, kanzono,... 2/3 spektakloj vespere kaj diversaj programoj posttagmeze (pupteatro, kanzono, forumoj,...)

Ankaù **Korusa staĝo** kun Prezentado de **KONCERTO en ESPERANTO**

Ekzercadoj okazos dum 3 horoj matene kaj 1h30 posttagmeze.
La horaro estos organizita tiel ke la korusanoj povos spekti la spektaklojn de KAFE
La aliĝintaj korusanoj ricevos la partiturojn kontraŭ 50FF.

La festivalejo estas kasteleto transformita al spektaklejo, meze de vasta arboza parko, en kiu staros tendego. Ankaŭ estos manĝ- kaj trink-budoj. La Organiza Komitato de **KAFE** zorgos por vi pri loĝado transporto kaj aliaj servoj por ke via partopreno estu plej agrabla.

| | |
|---|---|
| **Aliĝiloj : KAFE** /Esperanto-Kultur-Centro,<br>1 rue Jean Aillet, FR31000 Toulouse<br>✆/faks 33/(0)562 480 719<br>TTT-ejo :<br>http://perso.wanadoo.fr/kultur.art.festival.eo/ | **Programo :** Floréal Martorell,<br>EurokkaFR31450 Donneville<br>✆ 33/(0)561 819 565<br>Faks 33/(0)534 660 415<br>🖳 eurokka@esperanto.org |
| UEA-konto : kaft-g (kun t kiel Tuluzo!)<br>Postkonto : Espéranto Midi-Pyrénées 31264Z Toulouse | |
| Loĝado : Christine Vidotto christine.vidotto@laposte.net | |

**ALIĜOJ**

| ĝis... | 30/04 2000 | | 01/07 2000 | | Sur loke | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| | A | B | A | B | A | B |
| FRF | 400 | 300 | 450 | 350 | 500 | 400 |
| Euro | 61 | 46 | 69 | 53.5 | 76.5 | 61 |

Eblas aliĝi por 1, 2, 3 tagoj

B netranspagipovaj landoj (Orienteŭropo, Afriko, ...)
A aliaj landoj (Okcidenteŭropo, Usono, ...)

## Aliĝilo al KAFE Tuluzo 2000

| | | | |
|---|---|---|---|
| Persona nomo | | | |
| Familia nomo | | | |
| Adreso | | | |
| Poŝtkodo, urbo | | | |
| Lando | | | |
| Telefono | | Fakso | |
| Retpoŝto | | | |

Mi sendas pagon per :UEA-konto ☐ Poŝtkonto de Espéranto Midi-Pyrénées ☐
Mi bezonas invitleteron al Francio ☐
Pasportnumero :............................................................................
Dato de ekvalido .../.../....... dato de validfino : ........./........./........
Dato :..../..../......   Subskribo por akcepto de ĉiuj kondiĉoj :

*Laŭ via mendo ni luprenos ĉambrojn en hoteloj : de 155 FRF (24 euroj) (3-lita en dustela) ĝis 450 FRF ~ 70 euroj (dulita en tristela hotelo) por unu nokto. Lokojn en tendumejo vi havos por ĉirkaŭ 300 FRF ~ 45 euroj por tuta semajno.*
*Manĝojn vi povos ricevi kontraŭ 30 ĝis 80 FRF (5 ĝis 12 euroj) : estos diversaj elekteblecoj.*

# PROGRAMO

| | | |
|---|---|---|
| Merkredon **5** | Akcepto de la partoprenantoj ekde la mateno<br>Komenciĝo de la ĥorstaĝo | 20a La Kompanoj<br>JoMo sola akustike<br>Solotronik.<br>24a Diskoteko |
| Ĵaŭdon **6** | Aktivadoj okazontaj <u>ĉiu tage</u> :<br>starto de la atelieroj | 18a Teatro :Jerzy Fornal (konfirmota)<br>20a Ĵak Le Puil<br>Kore<br>24a Diskoteko |
| Vendredon **7** | <u>matene</u>:<br>Jogo,<br>danco,<br>kanto-staĝo,<br>desegnateliero,<br>ekskursoj, ktp | 18a Ĵomart & Nataŝa<br>20a 9 tuluzaj bandoj bru-muzikaj el la subgrunda kompil'<br>JoMo & Libertarios<br>Persone<br>24a Diskoteko |
| Sabaton **8** | <u>je la 15a :</u><br>artista forumo,<br>literatura forumo,<br>iberaj verkistoj<br>ekskursoj, | 18a F-ino Emily Barlaston<br>20a Jacques Yvart<br>Kajto<br>24a Diskoteko |
| Dimanĉon **9** | diversaj animadoj kun artistoj<br>sur subĉiela libera podio. | 18a Ĥora spektaklo far la staĝo-partoprenantoj<br>20a Kaj Tiel Plu<br>Kim (konfirmota)<br>Vigla Muziko (konfirmota)<br>Les Footeuses de Oaï (konfirmota)<br>24a Diskoteko |